# LIGILO

DE

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

N-RO 17 - JAN/FEB/MAR 1993

## KARA LEGANTO

NI LABORU KUNE!  NI LABORU KUNE!

Iom post iom niaj administraj laboroj enreliĝas. Pli kaj pli ni klopodas prezenti profesinivelajn servojn. La mikrokomputeroj rapidigas la plenumadon de niaj taskoj. La aŭtomatigo de la libro kaj de la abon-servoj atingas altan nivelon. Programo por kompleta aŭtomatigo de la perkoresponda kurso estas en preparo. Kaj de kiam BEL translokiĝis al Braziljo, oni ne vidis tiom da komfortoj samtempe kaj regule en la Oficejo, kaj espereble pli da laboruloj aldoniĝos post tre baldaŭa tempo laŭ promesite. La esperdonaj perspektivoj kaj premisoj por nia movado estas de ĉiuj konataj, *same kiel la sekvendaj vojoj por* "atingi nian celon en gloro". Nia potencialo en Brazilo estas enorma kaj ni nepre ĝin profitu. Do ni antaŭvidas nemezureblan progreson ek de la plej proksimaj tempoj, kondiĉe ke ni laboru! Sed, kion signifas "ni"? "Ni" estas estraranoj kaj ne estraranoj. "Ni" estas mi kaj vi. "Ni" estas la sumigo de ĉiuj esperantistoj. "Ni" estas nia unuiĝo. Kaj ek de nun BEL invitas vin persekuti tiun unuiĝon, kiel kondiĉo por la plenumado de sia institucia funkcio kaj vojo por konkretigi *nia aferon, kiu estas nur de "Ni", la esperantistoj.* Do

NI LABORU KUNE!

# LIGILO

Oficiala organo de
BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 03625 70084-970 Brasilia (DF) Telefono: (061) 226-1298

Aperas trimonate
Redaktas BEL-Estraro

ESTRARO DE BEL

Prezidanto . . . . . Néia Lúcia Souza
Vic-Prezidanto. . . Francisco Mattos de Oliveira
1-a Sekretario . . José Carlos Dorini Ramos
2-a Sekretario . . Wilson Álvares de Oliveira
3-a Sekretario . . Lício de Almeida Castro
1-a Kasisto . . . . Aymoré Vaz Pinto
2-a Kasisto . . . . Maria das Dores Góes

Kontrolkomisiono

Altino Araújo Vasconcellos
José Romão Filho
Paulo Ricardo Grazziotin Gomes

Anstataŭantoj

Adolpho de Miranda Silva
Ismael de Miranda e Silva
Maria Isabel Botelho Ramos

KOMITATANO "A"

Symilde Schenk Ledon

LIBROSERVO

Francisco Mattos de Oliveira
Adolpho de Miranda Silva

PERKORESPONDA KURSO

Francisco Mattos de Oliveira
Carlos Maria

INFORMADIKO

José Carlos Dorini Ramos
Wilson Álvares de Oliveira

ARKIVO

Cleto Galvão da Silva

# FONDAĴO ALMADA

La celo de Fondaĵo Almada estas finance subteni BEL-on rilate al specialaj projektoj. La Federacia Konsilantaro de BEL ĝin starigis dum la 28-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Anápolis julie/92. Ĉiaj donacoj estas bonvenaj, tamen, laŭ decido de FK tiu, kiu donacas minimuman kvanton samvalore al 26 usonaj dolaroj antaŭ la 29-a Brazila Kongreso (julio/93) iĝas kunfondanto de Fondaĵo Almada. Sube ni listigas la donacojn, kiuj ankoraŭ ne aperis en LIGILO kaj tre dankas al ĉiuj:

| | | |
|---|---|---|
| Audino Castelo Branco | Cr$ | 100.000,00 |
| Denise Arneiro Deslandes | | 100.000,00 |
| Elvira Fontes | | 150.000,00 |
| José Dias Pinto | | 1.000.000,00 |
| José Maurício da Silva | | 500.000,00 |
| José Passini | | 338.000,00 |
| Moacir Eustáquio da Silva | | 348.200,00 |
| Néia Lúcia Souza | | 200.000,00 |
| Neusa Priscotin Mendes | | 105.160,00 |
| Nydia Aydos Krieger | | 509.600,00 |
| Regina Helena de Mello Baldovino | | 405.600,00 |
| Ronie Cardoso Filho | | 500.000,00 |

Krom la listigitaj donacoj, BEL-Libroservo deponis en la konton de Fondaĵo Almada la kvanton de Cr$ 2.250.000,00. Temas pri aĉeto de 90 libroj "ESPERANTO LINGUA VIVA" kiujn la aŭtoro, Prof Paulo Amorim Cardoso en februaro/93 sendis al ni, kiel efektivigo de sia donaco, anoncita en LIGILO n-ro 15. La speciala ŝparkonto de FA ĉe "Banco do Brasil" enhavas ĝis la 19-an de marto la sumon de Cr$ 40.017.116,00, pli malpli US$ 1.542,00. Tio ne estas granda sumo kompare kun la prezoj de konstruaĵoj en Braziljo. Tamen obstine ni daŭrigas la kampanjon ĝis la fino de 1994, kiam BEL redonos la pruntedonitan ĉambron nomita sidejo II. Ĉu tiam ni havos monon por akiri ion similan ? Por ke la respondo estu JES, ni ĉiuj devas krei kondiĉojn favorajn al atingo de la dezirata celo. Siaflanke, BEL-estraro serĉas "vojojn" surbaze de siaj ordinaraj rimedoj: Libroservo kaj Perkoresponda Kurso. Ekzemple, procento de la valoroj de libroj aŭ kursoj naciskale disvenditaj estus destinita al FA. Se la ideo montros sin ebla, BEL estonte revenos al la temo. Dume ni atendas sugestojn kaj helpojn de ĉiuj, kiuj revas pri bela kaj taŭga sidejo por la landa asocio.

# TRA BRAZILO

ECO - BRASILIA

Rilate al nia antaŭa informo pri la "Interparlamenta Konferenco pri Medio kaj Disvolvigo" kaj "5-a Nacia Rencontiĝo de Sendependaj Ekologiismaj Institucioj", ni aldonas kompletan raporton, farita de S-ino Ürsula Grattapaglia kaj ricevita de BEL post la finkompostado de LIGILO n-ro 16. Jen la raporto:

En "ECO-BRASILIA" inter la 22-a kaj 29-a de novembro BEL aktive partoprenis. Aro da konferencoj okazis paralele al la INTERPARLAMENTA KONFERENCO PRI MEDIO KAJ EVOLUO, lasta oficiala evento de Rio'92, kiu realiĝis en la Centro de Convenções, kiu siatempe gastigis la 66-an Universalan Kongreson de UEA. En la granda Foirhalo en la parko de Brasília, kie multaj NRO-oj (Ne registaraj Organizaĵoj ) ekspozicis ekologiajn problemojn kaj proponojn por solvoj, BEL muntis informstandon, kie deĵoris pluraj esperantistoj de Brasília kaj eĉ el Italio alveninte UEA-delegitino S. Genovese. En la Komisiono por Mediprotektado kaj Minoritatoj de la Brazila Parlamento okazis publika aŭdienco la 26-an de novembro pri la temo " Konsideroj de la Forumo en Rio kaj la perspektivoj de la NRO-oj, kun la ĉeesto de la ĉefaj organizintoj de la evento en Rio junie, Tony Gross kaj Liszt Vieira, kaj altranga konsilisto de la la brazila eksterlanda Ministerio ITAMARATY. Kiam tiuj prelegantoj mencis la lingvajn problemojn post-Rio pri pene malrapida tradukado de dokumentoj de la Internacia Forumo, S-ino Ürsula Grattapaglia havis okazon taŭge interveni, rekomendante la 14-an artikolon de la internacia traktado ETIKA KOMPROMISO, kiu parolas pri la ĝenerala adopto de Esperanto inter NRO-oj de la tuta mondo. La ĉeestanta publiko konsistis el federaciaj deputitoj de tiu komisiono kaj multaj estraranoj de brazilaj NRO-oj. Itala parlamentantino EMMA BONINO estro de la delegacio al la Konferenco, prelegis mallonge pri la Transnacia Partio(kies nuna sidejo troviĝas en Roma) en la kadro de la Seminario "Direktivoj de agado por la Mediprotektado en Brazilo " antaŭ deputitoj kaj NRO-oj. Komencante sian intervenon en la hispana lingvo, ŝi deklaris sian bedaŭron pri la fakto, ke ŝi ne regas la portugalan kaj la aŭskultantoj tre verŝajne "ne regas la Internacian Lingvon Esperanton, lingvo sen hegemonioj, por kiu ŝia Partio engaĝite luktas en Eŭropo " ricevante belan aplaŭdon. Tiu-ĉi interveno same okazis en la Komisiono por Medio kaj Minoritatoj de la Brazila Parlamento, kie oni samtempe distribuis inform-materialon pri Esperanto. Dum akcepto de la deputitino EMMA BONINO en la sidejo de BEL, kun la ĉeesto de pli ol dudek lokaj esperantistoj, oni vigle interŝanĝis kun ŝi opiniojn pri laborstrategioj kaj eventuala kunlaboro. Hermano

Lins Albuquerque, prezidanto de Esperanto-Asocio de Brasília, transdonis formale leteron kun rekomendoj al la Interparlamenta Unio pri la komunikproblemoj kaj la solvo per Esperanto. S-ino Bonino promesis interveni tiurilate kiel eble plej baldaŭ. Cetere ŝi sukcesis distribuigi informaterialon, produktitan de UEA, al parlamentanoj el pli ol 50 diversaj landoj dum la INTERPARLAMENTA KONFERENCO.

SEPA ESPERANTO-RENKONTIĜO DE ŜTATO RIO DE JANEIRO

Sub la zorgoj de samideano Luiz Alberto de Oliveira Coelho okazos en Paraíba do Sul, la SEPA ESPERANTO-RENKONTIĜO DE ŜTATO RIO DE JANEIRO, de la 14-a ĝis la 16-a de majo 1993, organizita de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro. Pliajn informojn petu de AERJ, kies adreso estas Rua Senador Dantas 117, sala nr. 1341, CEP 20031-201 Rio de Janeiro (RJ).

ESPERANTO-KURSOJ EN UNIVERSITATOJ

Dum ĉi-tiu semestro okazas Esperantaj kursoj en universitatoj de Goiânia (GO) kaj Brasília (DF). Kvankam ne-devigaj kursoj, ambaŭ estas tre gravaj por la disvastigado de Esperanto en tia altnivela medio. D-ro Lício, la 3-a sekretario de BEL, oratoris dum la inaŭgura lekcio en tiu kurso de Brasília. BEL gratulas Profesorojn Raul Conde (Goiânia), Maria Ester P. de Souza kaj Margarete Welker (Brasília), la respondeculoj pri tiuj iniciatoj.

ESPERANTO-GRUPO KUNVENAS EN GIMNAZIO

Maurice Farley informas, ke la esperantistoj de Juazeiro do Norte ( CE ) sukcesis permeson por kunveni ĉiusabate en la urba gimnazio. Havigi taŭgan lokon por kunveni estas granda defio por la esperantistoj. Do ni esperas, ke niaj samideanoj de Juazeiro daŭrigu sian laboron kun pli da venkoj. Ili ankaŭ petas, ke oni sendu leteron aŭ karton kun gratuloj kaj dankoj al S-ro Flávio Queiroz , estro de Ginásio Municipal Antonio Xavier de Oliveira, Praça Juvêncio Santana s/n, 63010-011 JUAZEIRO DO NORTE (CE)

PERNAMBUKA ESPERANTO-ASOCIO EN LA FEDERACIA KONSILATARO

La estrara raporto publikigita en LIGILO n-ro 14 ne mencias PEA-on kiel aligita al FEDERACIA KONSILANTARO. En nomo de la tiama estraro ni pardonpetas de PEA kaj aldonas, ke ĝi aliĝis tuj post la translokigo de BEL al Brasília, t.e. en 1986!

CURITIBA (PR)

En la 17-a de aprilo en la Federala Universitato de Paraná oni aŭdos ĵuron ĉe diplomiĝo ankaŭ pere de Esperanto krom kvin aliaj lingvoj. Gratulon al Marcelo Luiz Brasil, kiu ebligis tian venkon!

## NASKIĜTAGO DE ZAMENHOF

BEL sendis leteron al enlandaj esperantaj grupoj por ke ili raportu pri okazaĵoj en ties urboj omaĝe al Zamenhof dum la lasta decembro. Tre malmultaj festis (aŭ respondis). Jen la resumo: Esperanto-Asocio de Santa Catarina aranĝis feston en "Domo Simpozio", ĉe Kultura Fondaĵo Simpozio, en Campeche. Tie okazis prelegoj, muzikaŭdado, lunĉo kaj, kompreneble, babilado.
Esperanto-Asocio de São Paulo solene kunvenis, kun alvoko al la pli esltaraj esperantistoj ĉeestantaj por altabliĝi, samkiel la prezidanto de la asocio, kiu salutas per elparolo; distribuo de diplomoj al gelernantoj de la asocio kaj de aliaj enurbaj kursoj de Esperanto; distribuo de premioj al gelernantoj; arteraj prezentadoj ( kanto, deklamado, skeĉo ktp ); elparolo de reprezentanto de gelernantoj; parolado de la soleno-prezidanto; fermo per kantado de "La Espero" kaj regalo de frandaĵoj.
Esperantista Societo de Porto Alegre profitis la 7-an Esperanto Semajnfinon de Porto Alegre, realigita ĉe aŭditorio de Federala Universitato, por omaĝi nian majstron. Okazis kultur-turniro kiel programero, pri la vivo de Zamenhof kaj la unuaj tempoj de Esperanto-Movado.
Ni supozas, ke en aliaj urboj ankaŭ oni omaĝis la kreinton de Esperanto. Venontfoje eble pli da raportoj atingos nin. BEL-estraro proponas, ke en ĉiu brazila urbo kie ekzistas esperantisto, tiu samideano memorfestu la 15-an de decembro, ĉiujare!

## ESPERANTO-ASOCIO DE SAN-PAŬLO

EASP sendis al ni sian lastan estrar-raporton, el kies enhavo ni reliefigas: diversnivelajn esperantajn kursojn; bibliotekon kun 1150 titoloj, Brajlan Departamenton, publikigon de dumonata bulteno kaj trimonata revuo. Ni memorigas, ke EASP krom sia tre riĉa agado, efike organizas la 29-an Brazilan Kongreson de Esperanto.

## ESPERANTO-ASOCIO DE SANTA CATARINA

Laŭ letero de EASC , estas programita marta festarangô en Domo Simpozio por allogi esperantistojn je vizitadi tiun kulturan lokon kaj samtempe spiri samideanecan etoson. EASC regule subtenas kursojn per korespondado (Baza, Progresiva kaj Perfektiga).

## ALAGOANA ASOCIO DE ESPERANTO

Nova estraro enposteniĝis en AAE kaj estros tiun asocion ĝis 1994. Al la prezidanto Aristóphio Andrade Alves Filho kaj skipo ni deziras plenan sukceson!

ESPERANTO-KLUBO DE MONTES CLAROS (MG)

En la 9-a de januaro EKMC okazigis kunvenon por prezenti estrar-raporton, elekti novan estraron por 93/94 kaj aprobi agadplanon. Ni gratulas kaj deziras sukceson!

PORTO ALEGRE (RS)

Lucila D. Fernandes, direktorino de Esperanto-Departamento de S.E.A.KARDEC, sendis al BEL kompletan raporton pri la funkciado de DESEAK dum 1992. Notindaj estas la laboroj efektivigitaj en diversaj urboj krom Porto Alegre mem, inkluzive en ne esperantista medio.
Esperanto-Departamento de Spiritisma Societo "Irmão Miranda" aranĝos ĉi-jare dunivelajn E-kursojn en la gaŭĉa ĉefurbo.

VOLTA REDONDA (RJ)

Kultura Teknika Instituto, privata teknika lernejo gvidata de Prof. Wladir de Souza Telles diplomis dek lernantojn en sia unua Baza Esperanto Kurso. La cerimonio okazis kune kun la diplomiĝo de ĉirkaŭ 800 homoj, gelernantoj de elektronika, mekanika kaj informadika kursoj. BEL gratulas s-on Mauricio Monken Gomes, kiu estis la instruisto.

PARACATU (MG)

De la 20-a gis la 23-a/02/93 okazis la 37-a "CONCAFRAS" kongreso, kiu kunvenigis 1350 spiritistojn. La urbestro de Paracatu akceptis la kongresanojn kaj donis grandan stimulon al evento. Kadre de la kongreso efektiviĝis esperanta kurso kun 84 partoprenantoj, instruitaj de samideanoj Arnaldo Alves de Oliveira (São Paulo) kaj Lício de Almeida Castro (Brasília). La kongreso 1994 realiĝos en la urbo Ceres (GO). Ni deziras ke E-o denove ĉeestu.

GOIANIA (GO)

"Zamenhof Editores" kaj "Agenda Assessoria e Consultoria Empresarial" okazigos en la Federala Universitato de Goiás, de la 9-a ĝis la 11-a de oktobro 1993, la 1-an Brazilan Kongreson de Interlingvistiko kaj Esperantologio, kun la apogo de Brazila E-o Ligo. Prelegos Profesoroj Geraldo Mattos, José Passini, Leopoldo Knoedt kaj Sylla Chaves. Pliajn informojn petu de BEL.

# NIA MONDO

## KULTURA ESPERANTO-DOMO

Temas pri Kastelo Grésillon, en Francio, el kie BEL ricevis (kiel ordinare okazas ĉiujare) leteron kun peto por la programo-diskonigo. La leteron akompanis kompleta informilo. K.E.D. organizas aŭ gastigas kursojn diversgradajn, prelegojn diverstemajn, distraĵojn diverspecajn, ekskursojn en belega regiono. Krome, ĝi publikigas la revuon "Kulturaj Kajeroj" el kiu vi povas havigi senpagan ekzempleron ĉe: "17, Rue Romain Rolland, F-85100 Le Chateau D'olonne, Francio"

## KONTRAŬEKSTERLANDANAJ ATAKOJ EN GERMANIO

BEL ricevis leteron de Germana Esperanto-Asocio datita de la 20-a de oktobro 1992, kiu ne atingis nin ĝustatempe por publikigo en LIGILO n-ro 16. Tamen pro la graveco de la temo ni mencias ĝin ĉi-numere. Akompanis la leteron Resolucio de GEA titolita "Rezolucio de Germana Esperanto-Asocio okaze de la kontraŭeksterlandanaj atakoj dum la lastaj monatoj en Germanio" Tiu teksto estis sendita, laŭ la letero, al la Landaj Asocioj de UEA kaj al Esperantaj revuoj. Ĝin ni povis legi jam publikita en la Revuo Esperanto kaj la Ĵurnalo Eventoj. Ni ne reproduktas la rezolucion, sed tamen la leteron kaj prezentas nian solidarecon ĉu al la atakataj popoloj ĉu al Germana Esperanto-Asocio, kiu en tia tikla landa momento ne forgesis la esencon de pro-esperanta organizaĵo - " Kompreno kaj paco inter homoj de malsamaj naciecoj", kiam publike reasertas tion. Jen la letero:

"Estimataj gesamideanoj,
kun abomeno kaj hororo ni vidas, ke dum la lastaj monatoj okazis pli kaj pli ofte atakoj kontraŭ eksterlandanoj en nia lando. Esperantistoj ne povas toleri tion. Pro tio la estraro de GEA per rezolucio apelaciis al la membroj kaj al ĉiuj Esperanto-amikoj, ke ili kun ankoraŭ pli da civila kuraĝo ol ĝis nun aktivu por la protekto de alilandaj homoj en Germanio. La rezolucion ni sendis - germanlingve - al multaj ĵurnaloj, revuoj radio kaj televidstacioj, politikaj partioj ktp. en Germanio. Mi sendas aldone la esperantlingvan tekston de la rezolucio informcele al vi kaj mi petas laŭeble informi viajn membrojn kaj legantojn. Kun samideanaj salutoj, D-ro Wolfgang Schwanzer, Prezidanto de GEA"

## 78-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La aliĝintoj al 78-a UK jam ricevis la Duan Bultenon kun granda aro da informoj pri Valencio, la kongreso, ekskursoj ktp. Bedaŭrinde malmultaj brazilanoj aliĝis al tiu kongreso. Kompreneble vojaĝi al Eŭropo estas multekoste. Tamen se vi kutime turismas enlande, komparu la prezojn. Eble surprizo vin frapos. Do ne perdu la ŝancon kongresi internacie en lando kies kulturo kaj lingvo ne estas tiel strangaj por ni.

## LA SKOLTA MONDO

BEL ricevis provnumeron de gazeto publikigita de Skolta Esperanto Ligo. Laŭ ĝia redaktanto, LSM estas la sola skolta gazeto en Esperanto kaj pri Esperanto, perilo inter la skolta kaj la Esperanta movadoj kaj la sola internacia skolta gazeto por la plej multaj de ĝiaj legantoj. En Brazilo reprezentas SEL-on S-ro Hiroshi Akamine, strato Maquerobi 93, CEP 04053 São Paulo-SP. Se vi volas apogi skoltismon pere de abono al tiu gazeto, skribu al ni. Se estos multaj reagoj, BEL provos peri ĝin.

## ESPERANTO KAJ EKONOMIO

Iom post iom, Esperanto eniras la ekonomian mondon. Tion atestas la regula eldonado de "Ekonomia Bulteno pri Usono", far de INTERFAKTO (el Washington), kaj "Monda Merkato", tutmonda informservo kaj anoncgazeto, redaktita en Germanio.

## NI KONDOLENCAS

Esperanto-Asocio de Santa Catarina informas per cirkulero, ke la 18-an de decembro 1992 forpasis Prof-ro Glauco Rodrigues Correa, 63-jaraĝa, universitata emeritulo. Li kunfondis kaj prezidis tiun asocion. Kontribuis en la kultura agadkampo, pere de artikoloj, tradukoj kaj enigmaroj ĉiuspecaj.

# BEL-ANGULO

## ĈU ESTRARANOJ RAJTAS FERII ?

Ordinare kiam alvenas la jarfino, kristnaskaj festoj k.s. kelkaj estraranoj kaj kunlaborantoj de BEL kaptas la okazon de la feriotagoj por vojaĝi, dum aliaj ferias tutan monaton. Tiaj laboremuloj forlasas siajn taskojn kun hezito, ĉar jam scias, ke kiam ili revenos certe trovos monton da leteroj kun plendoj pri prokrastoj, ne ricevo de revuoj, manko de respondo al informpetoj ktd. Dum ni startas la demandon pri la rajto ferii, ni klopodas trovi solvojn por ke en tiaj okazoj la agado ĉe BEL ne suferu ritmo-rompon, ĝis nun vane. Kompreneble ni plu klopodos kaj dume ni petas de niaj asocianoj senkulpigojn pro la mankoj kaj prokrastoj.

## INTEGRIĜO DE LA ĴUS BAKITAJ GEESPERANTISTOJ AL LA MOVADO

Al esperantaj instruistoj de ĉiunivelaj kaj de ĉiuspecaj kursoj ni petas sendi al BEL la adresojn de la kursfinintoj. BEL klopodos esti ilo inter tiuj homoj kaj la esperanta vivo. Ni sendos al ili la samajn informojn sendatajn al la kursfinintoj de BEL-Perkoresponda Kurso, nome: LIGILOn, informojn pri la enlandaj esperantaj kongresoj, inform-materialojn pri Koresponda Servo Mondskala, liston de revuoj aboneblaj pere de BEL, liston de perradiaj esperantaj programoj kaj rimedojn por la lingva plibonigo. Per tia agado BEL elpaŝos en la plenumo de unu el ĝiaj celoj, kiu estas "Kunordigo de la landa movado" kaj aliflanke helpos la lokan movadon en la klopodoj restigi en siaj kadroj la novajn esperantistojn.

## NOVA DONACO AL BEL

Kun granda ĝojo BEL gajnis de esperantisto de Braziljo modernan mikrokomputeron. Ĝi estas tipo "AT", modelo 386 kaj IBM-kongrua. Do nun estas du mikrokomputeroj en BEL-sidejo kiuj faciligos la plenumadon de rutinaj taskoj kaj la pretigon de LIGILO. La donacinto preferas resti anonime. Ni respektas lian volon kaj tre dankas lin pro la valorega donaco, kiu helpas la nunan estraron persisti en sia laboro por konkretigo de subtenaj bazoj, celante pli altan ekflugon.

## BEL-PREZIDANTINO TRANSLOKIĜIS

Komence de marto, nia prezidantino Néia Lúcia Souza translokiĝis de Braziljo al Macapá, ĉefurbo de ŝtato Amapá, kie restos dum mallonga - ni fervore esperas - tempo. Kompreneble tio malfaciligas iomete la funkciadon de BEL rilate al la estraraj taskoj. Ni tamen ne bedaŭras tion, ĉar la translokiĝo signifas plibonigon en ŝia profesia vivo. Ke Dio donu al ŝi pli da sano, da forto kaj da kuraĝo por daŭrigi ŝian senlacan kaj kompetentan poresperantan agadon.

# AGENDO




27-28 MAR 93 Recife - PE
VI Laborkunsido de Nordorientaj Esperanto-Asocioj

08-11 APR 93 Villa Carlos Paz - ARGENTINIO
Seminario de Esperanto

14-16 MAJ 93 Paraíba do Sul - RJ
Sepa Esperanto-Renkontiĝo de ŝtato Rio-de-Janeiro

12-17 JUL 93 San-Paŭlo - SP
29-a Brazila Kongreso de Esperanto

24-31 JUL 93 Valencio - HISPANIO
78-a Universala Kongreso de Esperanto

25-29 JUL 93 Ribeirão Preto - SP
54-a Tutamerika Medicina Kongreso de Homeopatio

09-11 OKT 93 Goiânia - GO
1-a Brazila Kongreso de Interlingvistiko kaj Esperantologio

Nepre informu al ni la eventon. Plezure ni ĝin diskonigos!

## 29-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Kun belaspekto kaj riĉa informa enhavo, KONGRESEROJ N-ro 2 jam estas dissendita. Ĝi pritraktas la ĉeftemon de 29-a BKE, detale instruas kiel atingi la kongresejon, listigas 13 hotelojn diverskategoriajn, prezentas statistikon pri la aliĝintoj, kiuj sumis 244 en januaro. La partoprenintoj la 28-an BKE, en Anápolis, konstatis ke ĝi estis tre bone organizita. La ĝisnune montrita planado farita de S-ro Gilbert Ledon kaj skipo eblas antaŭvidi novan brilan nacian kongreson, kune kun la 14-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso. BEL-estraro gratulas la Lokan Organizan Komitaton kaj ĉiujn kunlaborantojn.

Remetente: BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 03625 CEP 70084-970
BRASÍLIA - DF Telef: 061 226-1298

27-28 MAR 93 Recife - PE
VI Laborkunsido de Nordorientaj Esperanto-Asocioj

06-11 APR 93 Villa Carlos Paz - ARGENTINIO
Seminario de Esperanto

14-16 MAJ 93 Paraiba do Sul - RJ
Sepa Esperanto-Renkontiĝo de Ŝtato Rio-de-Janeiro

12-17 JUL 93 San-Paŭlo - SP
29-a Brazila Kongreso de Esperanto

24-31 JUL 93 Valencio - HISPANIO
78-a Universala Kongreso de Esperanto

25-29 JUL 93 Ribeirão Preto - SP
54-a Tutamerika Medicina Kongreso de Homeopatio

09-11 OKT 93 Goiânia - GO
1-a Brazila Kongreso de Interlingvistiko kaj Esperantologio

Nepre informu al ni la eventon. Plezure ni ĝin diskonigos!

29-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Kun belaspekto kaj riĉa informa enhavo, KONGRESEROJ N-ro 2 jam estas dissendita. Ĝi pritraktas la ĉeftemon de 29-a BKE, detale instruas kiel atingi la kongresejon, listigas 13 hotelojn diverskategoriajn, prezentas statistikon pri la aliĝintoj. Kiuj sumis 244 en januaro. La partoprenintoj la 28-an BKE, en Anápolis, konstatis ke ĝi estis tre bone organizita. La ĝisnune montrita planado farita de S-ro Gilbert Ledon kaj skipo ebligas antaŭvidi novan brilan nacian kongreson, kune kun la 14-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso. BEL-estraro gratulas la Lokan Organizan Komitaton kaj ĉiujn kunlaborantojn.

I M P R E S S O